

Precesio de ekvinoksoj (vidu 8 marto)

**Kluba Programo:****marto:**

- 1 John Wells: *Lingva Seminario* (1800h: konsilantaro)
- 8 Francisko Garcia: *Astrologio kaj Esperanto*
- 15 Socia Vespero
- 22 JARKUNSIDO
- 29 Paska Vendredo – Neniu kunveno

**aprilo:**

- 5 Socia Vespero
- 12 Lingva Seminario (1800h: konsilantaro)
- 19 Socia Vespero
- 26 Heleno Fantom: *El la Maniko de nia Libroretaro*

**majo:**

- 3 Socia Vespero

**Esperanta Kalendaro:**


10-12 majo: Brita Kongreso 2013, Ramsgate. Informo: eab@esperanto.org, 01782 372141  
 20-27 julio: 98a Universala Kongreso, Rejkjavik, Islando. [http://uea.org/kongresoj/uk\\_2013.html](http://uea.org/kongresoj/uk_2013.html)

**“La inventado de Esperanto tre bone estas tre akvaria ideo kiu, kiel internacia lingvo, pruvas deziron de monda kunlaboro.”**

“La volbo ĉiela enhavas la tutan destinon de la homaro. Grandaj cikloj markas la historion de la popoloj. Ni alproksimiĝas en la Oran Epokon. La Grandaj Civilizacioj estas karakterizataj far precesia movado.

Laŭ la ekvinoksa precesio, la Suno eniras en Akvarion je 21 de Marto de 1948. La Erao de Akvarius simboligas novan ciklon de 2000 jaroj kaj markas renoviĝon. Oni devas klopodi scii tion kio estos la nova influo spiritalia kiu portas ĉi tiu epoko Amfora, Epoko de Prospero kaj Paco. La spuroj de la Amfora spirito estas: Frateco, Leviĝeco, Spiritualeco, Movadoj Universalaj, Provoj de Alproksimiĝo Grandnivela.

Ĉio estas ene de Zodiako ĉar ĝi estas reprezento pri tio Senfine Granda kiel pri tio Senfine Eta. Granda kosmo kaj eta kosmo estas streĉe ligitaj.”

**Majstro Dr-o Serge Raynaud de la Ferriere.**

(Tradukis Francisko J. Garcia)

**Aliaj anoncoj:**

*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a aprilo por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babilo.

Kutima programo:

18:00 - 19:15 *beginners' class*

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero

22:00 fino



Loko: London Irish Centre,  
50-52 Camden Square, NW1 9XB  
(tel: 020-7916 7272)

Metrostacio: Camden Town

Fervojo *London Overground*: Camden Road

Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 [esperanto-sleg@tiscali.co.uk](mailto:esperanto-sleg@tiscali.co.uk).

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close,  
Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray,  
11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB  
01932-345779 [yarrump@gmail.com](mailto:yarrump@gmail.com).

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily;  
Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo  
Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Michael Sims, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) [lek-sekretario@gmail.com](mailto:lek-sekretario@gmail.com);

Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ [ap\\_esp-lek21@yahoo.co.uk](mailto:ap_esp-lek21@yahoo.co.uk),

Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP [terry\\_page@btinternet.com](mailto:terry_page@btinternet.com), [anica\\_page@btinternet.com](mailto:anica_page@btinternet.com),

Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY [acj.rawlinson@ntlworld.com](mailto:acj.rawlinson@ntlworld.com).

## Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Rerigardante al 2012, mi miris pri la diverseco de LEKanoj kaj unuope kaj kolektive. Ekzemple, pro multetne slava demografio, ni ĝuis serion da prezentoj pri lingvoj slovaka, slovena ktp. Pro entreprenemaj agadoj, ni gastigis libro-lanĉon de treege impona volumo de Esperanto-anglaj tradukoj. Pro inda fiereco pri propraj kulturoj, ni aŭdis pri tradiciaĵoj el Japanio, Litovio kaj Irako. Pro aventuremo, nin regalis fotomontrado kaj rakontado pri vojaĝoj tra Afriko; ni ankaŭ lernis multon pri alies vivplena kaj aktiva kosmopolitismo. Cetere, ni kuraĝis eĉ eliri la LEKejon en varma vetero, por restoraciumi kaj padumi.

Ni do rajtas, levante la mentonon, gratuli nin. Mi mem certe gratulas tiujn LEKanojn, kiuj aŭ instigis tiom da aferoj aŭ mem gvidis. Malgraŭ manko de homforto, nia Klubo daŭras kun forta karaktero.

Estontece, ni daŭrigu nian esploradon de la Londona ĉirkaŭaĵon ĉi-somere, per pli da promenoj kaj aliaj ekskursoj. Kial ne?

Intertempe, tamen, nepras, ke vi tutlegu la ĉi-tiean Suplementon, konsistantan el dokumentoj rilate al la baldaŭa **JARKUNSIDO** (Tagordo, Protokolo, Jarraporto). La tuta enhavo gravas precipe por tiuj membroj kiuj intencas ĉeesti tiun kunvenon je la 22a de marto - ĉar antaŭfamiliareco kun ĉio senkompare plibonigos la glatecon kaj enhavon de la Jarkunsido mem.

David Thornell

